# THE BRITISH ESPERANTIST

with which is incorporated "International Language"

55th Year, No. 643 | PRICE - ONE SHILLING or Ten Shillings per year, post free | February, 1959

## VERE BELAJ LIBROJ

**por via propra libraro**

**Fundamenta Krestomatio.** L. L. Zamenhof. 17-a eldono. 442 paĝoj. Bele presita per eleganta litertiparo sur tre bona papero, kaj fortike bindita en tolo kun surpresoj oraj kaj verdaj. 18ŝ. 9p., afranko 1ŝ. 6p.

"Estas evidente, ke la kompanio ne domaĝis kapitalelspezon, por ke la libro inde honoru la verkinton, kaj samtempe ĝojigu la leganton. Ne plu necesos, ke tiu streĉu la okulojn, legante palajn literojn sur dubeflava fono. La litertiparo estas pli granda, ol tiuj en la antaŭaj eldonoj, la papero multe pli bona, kaj la paleverda bindaĵo fortika kaj alloga." *The British Esperantist.*

**Atakoj kontraŭ Ĝardenplantoj.** D-ro Paul Neergaard. 234 paĝoj artpaperaj kun 9 kolorbildpaĝoj kaj 80 aliaj ilustraĵoj. Belege tuttole bindita, kun ora stampo, kaj kolorpresita kovrilo, desegnitaj de la Dana pentristo Mogens Zieler. Prezo 20ŝ., afranko 1ŝ. 9p.

"Ĉi tiu libro estas elstara gajno por nia fakliteraturo, kaj oni miras pri la relative malalta prezo por tia belaspekta kaj riĉe ilustrita verko." G. F. Makkink en *Nederlanda Esperantisto.*

**La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo.** Charles Dickens (M. C. Butler). 120 paĝoj en luksa eldono kun multaj ilustraĵoj. Tole bindita. 6ŝ., afranko 1ŝ. 3p.

"Laŭ ekstero, preso, papero, aranĝo, bindo, jes ĉio, la libro estas unu el la plej belaj esperantolibroj kiujn mi iam vidis." *Svenska Esperanto Tidningen.*

*Eldonita de*

**THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LIMITED**

*Mendu ĉe*

**THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Inc.,**

**140, Holland Park Avenue, London, W.11**

**aŭ enlanda libroservo**

# The British Esperantist

*Publishers :*

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, INC.
140, Holland Park Ave.,
London, W.11

*Editor :*

Mrs. G. OSMOTHERLY,
118, Lathom Road,
London, E.6

Contributions should be typewritten, in double spacing, and sent in by the 20th of the month previous to publication. The Editor reserves the right to refuse, correct, or shorten them. She is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned.

Advertisements : £3 per page and pro rata to one-eighth.


## *IN THIS ISSUE*


| | | page |
|---|---|---|
| Asociaj Grupoj | | 32 |
| Bloomsbury | | 17 |
| 17th Century I.L. Project | *D. B. Gregor* | 21 |
| El Leteroj | | 20 |
| Haveno de Sennombraj Ŝipoj | *A. J. L. Hughes* | 22 |
| La Ŝtelita Stelo | *J. W. Leslie* | 28 |
| Local News | | 30 |
| New Books | | 25 |
| Official Notices | | 31 |
| Paĝo por Geknaboj | *W. J. Nesbitt* | 24 |
| R.S.A. Examinations | | 18 |
| Students' Page | *W. A. Gething* | 27 |
| Translation Competition | | 19 |
| Universala Kongreso | | 29 |
| Zamenhof Centenary Campaign | | 23 |



**ZAMENHOF CENTENARY CONGRESS, 1959**

**Travel to Warsaw in Comfort by Air**

At the request of the B.E.A., an air party to the Congress is being organised by:—

LANCASTRIA TRAVEL SERVICE

the only Esperantist tourist service in Great Britain. The journey will be made by a specially chartered plane.

Write for details to

**LANCASTRIA TRAVEL SERVICE**

**9, Market Street, Watford, Herts.**

**Telephone: Watford 26261** **Telex: No. 23569**

The
# British Esperantist
THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

55TH YEAR, No. 643 FEBRUARY, 1959

## BLOOMSBURY

Dum la monatoj antaŭ Brita Kongreso kutime troviĝas en *B.E.* artikoloj pri la kongresurbo kaj pri ĝiaj supozataj vizitemullogaĵoj. Ĉi-jare la Kongreso okazos en Londono, urbego tiel granda, ke elekti el ĝiaj miloj da vidindaĵoj kaj supozi, ke la elekto plaĉos al eĉ malmultaj el la nelondonanaj kongresanoj, estus vane.

Sed la Kongreso havos lokon ĝuste en la mezo de la kvartalo Bloomsbury, kiu ampleksas pli ol sufiĉe da interesaĵoj por plenigi la disponeblajn horojn de eĉ la plej vidindaĵavida kongresano. Li eĉ ne bezonos veturilon, ĉar la plej malproksima angulo de la kvartalo foras nur dekminutan promenon de la kongresejo. Tamen, por kontentiga esploro, stratplano de la centra parto de Londono estas nepra bezono. Se vi ankoraŭ ne posedas tion, vi povas aĉeti malkare en butiko tre proksime de la kongreso.

Oni povas sufiĉe difini la limojn de Bloomsbury dirante, ke ĝi okupas proksimume kvadratan terspacon inter Tottenham Court Road (okcidente) kaj Grays Inn Road (oriente). La norda limo estas Euston Road, la suda New Oxford Street kaj High Holborn. Ĝis post la mezo de la XVII jarcento Bloomsbury estis kampara. Ekzistis en ĝi kelkaj aparte starantaj domoj, sed tiutempa Londonano povis, starante en High Holborn, rigardi trans kampoj kaj farmbienoj la vilaĝojn Hampstead kaj Highgate, kiuj staris inter arbaroj kaj erikejoj sur la "nordaj altaĵoj". Ĉirkaŭ 1660 la grafo de Southampton iniciatis la konstruon de privataj domoj kaj butikoj en Bloomsbury Square kaj ĝia proksimo, sed ĝis la fino de la XVIII jarcento nur malmulte da konstruaĵoj staris norde de la linio Great Russell Street–Theobalds Road. Grava escepto estis la Hospitalo por Trovitaj Infanoj (Foundling Hospital), konstruigita ĉirkaŭ 1740 de la bonfarema ŝipkapitano Coram. Ĝia ĉefa pordego staras ankoraŭ en Guilford Street kontraŭ Lambs Conduit Street, sed la hospitalon mem oni malkonstruis ĉirkaŭ 1930 kaj ludparko por infanoj nun okupas ĝian lokon.

Ĉirkaŭ 1800 la tiama duko de Bedford, al kies bienoj apartenis preskaŭ la tuta tereno inter Tottenham Court Road kaj Southampton Row, komencis luigi grandskale sed pomalgrande terpecojn por laŭplana domkonstruo. Tio fariĝis plejparte pere de la konstruentreprenistoj Burton (ĝis 1817) kaj Cubitt (post 1820), kiuj tiel lerte planis, ke Bloomsbury, kun ĝiaj larĝaj placoj ("squares") kaj stratoj, fariĝis unu el la plej belaj urbkvartaloj de la mondo. Multaj malnovaj domoj ankoraŭ staras, kvankam plejofte ili nun funkcias kiel hoteloj aŭ oficejoj. Ŝajne eldonistoj kaj klerulaj kaj bonfaremaj asocioj tre ŝatas posedi oficejojn en Bloomsbury. Bona ekzemplo de la plej bona arkitekturo de la kvartalo estas Bedford Square, kie la domeksteroj restas preskaŭ tute ne ŝanĝitaj.

Krom loĝodomoj, diversaj grandaj publikaj konstruaĵoj troviĝas en Bloomsbury. Du el ili, la Brita Muzeo kaj University College, apartenas al la originala plano. Preskaŭ ĉiuj aliaj (ekzemple, la Universitato, University College Hospital, la grandaj oficejoj kaj la hotelegoj de Southampton Row) staras sur la lokoj de malaperintaj domoj kaj butikoj.

Vizitanto povas decidi antaŭe, kion li volas vidi. Egale bone li povas fari ne planitan vagadon, kaj eĉ tiamaniere li ne povas ne renkonti multe da interesaĵoj. Li ne forgesu legi la surskribojn sur la domoj; tiuj ofte donas agrablajn surprizojn.

En posta artikolo troviĝos notoj pri lokoj en Bloomsbury, kiuj havas specialan intereson por Esperantistoj.

*C. M. Houghton.*

---

## KAMPADISTOJ, EL VIAJ TENDOJ !

Lastatempe ni korespondis kun "Interrilata Centro Internacia de la Esperantistaj Kampadistoj", kiu certigas al ni, ke *"la kampadistoj de ĉiuj landoj volas interkompreniĝi"* kaj tion ni estas pretaj kredi.

Rezulte de nia korespondado, kaj pro aliaj bonaj faktoroj, ni metas reklamon pri Esperanto en la gazetoj *Youth Hosteller* kaj *Camping & Outdoor Life* ĉi-monate. (Ni volonte akceptas donacojn de Esperantistaj kampadistoj por saldi tiun elspezon de £13 !)

S-ro G. Gouget, 12, Avenue Alsace-Lorraine à Chartres (Eure et Loire), Francujo, estas unu el la sekretarioj de la nova organizaĵo, kiu esperas ricevi la helpon kaj kunlaboron ankaŭ de U.E.A.

Ni petas, ke ĉiu Brita Esperantista kampadisto, kiu legas ĉi tiun anoncon, bonvole estu tentita el sia tendo (por tiel diri !) por skribi al (*a*) B.E.A. kaj (*b*) al S-ro Gouget, proponante kunlaboron kun li kaj B.E.A. rilate al la starigo de Brita sekcio en ĉi tiu grava *kampo* !

Sendube Esperanto povas ludi gravan rolon en la vivo de kampadistoj kiuj vojaĝas ekster sia propra lando.

Do, kampadistoj—el viaj tendoj !

*J.W.L.*

## R.S.A. Examinations

The total number of entries, which used to be about 80–90 yearly, have this year gone down to a very low record, 29. If these figures are not considerably improved it seems unlikely that the R.S.A. will continue the examinations, which must now, owing to the cost of printing, cause considerable loss.

**Report of the Examiner: Stage I.** In all sections of the paper there were many grammatical errors, some of a very elementary kind, e.g. the non-agreement of adjectives with their nouns. Teachers should be careful to teach the full and proper meanings of words as found in "classical" Esperanto, and not popular conversational abbreviations and misuses. *Stage II.* On the whole, the work showed that the majority of the candidates had a very good knowledge of the language. *Stage III.* In Sections I and II the translations presented few difficulties, and in Section V all candidates showed ability to express their thoughts freely, although in most cases the literary style could be improved. The main weakness was in Section IV, which calls for ability to give an adequate and stylish rendering of what are, from a translator's point of view, awkward turns of speech.

## TRANSLATION COMPETITION

### Test Piece No. 18

### A Linguistic Ratio

Mauritius is a small island 720 square miles in area lying a little more than 500 miles off the east coast of the big French island of Madagascar. From 1507 to 1810 it was successively occupied by the Portuguese, the Dutch and the French until its capture by the British in 1810.

Within this small area the descendants of people from Europe, Africa, India and China—600,000 in all—rub shoulders together. On the linguistic fresco of Mauritius at the beginning of the 19th century the unavoidable tower of Babel stood out sharp and clear, but today it has been completely rubbed away by the emergency of a patois called "Creole". "Creole" is mainly corrupt French with just a little dash of Hindi, Malagasy, and English, and could be compared to pidgin English. Though providing the leitmotif for this potpourri of languages, "Creole" has the disadvantage of not possessing a written grammar and a standard spelling. But it has the incomparable advantage of being understood by every single inhabitant of the island, regardless of his racial origin.

Is it too much to hope that what "Creole" is to Mauritius, Esperanto will be to the world ?

* * *

The above article was submitted by a member living in Mauritius, Mr. G. B. Cathan. Readers are invited to translate it into Esperanto. Translations should be sent in an envelope marked *Traduko* and arrive at the B.E.A. Office before 21st March next. Books to be chosen from the B.E.A. Book List to the value of 10s. 6d. will be awarded to the sender of the best translation, if sufficient entries are received. The result will be announced in our May issue.

---

## BRITISH ESPERANTO CONGRESS

### London, Whitsuntide, 1959

**New Congress Members**

128. S. J. Smith
129. Mrs. S. J. Smith
130. Miss M. W. Gee
131. H. Milsom
132. H. K. Phelan
133. Mrs. Phelan
134. Mrs. E. Greenwood
135. Mrs. D. Worcester
136. Miss L. Moon
137. E. H. Beck
138. J. M. Garnett
139. W. M. Thomas
140. Mrs. Thomas
141. G. E. Collis
142. G. Dickinson
143. G. B. Tordoff
144. Miss D. Lonsdale
145. Mrs. M. R. Green
146. P. Buttinger
147. Mrs. Buttinger
148. J. W. Anderson
149. W. W. Gardiner
150. A. W. Thomson
151. F. J. Rogers

---

**Faktoj pri Germanujo.** Ĉi tiu libreto estas unu el la plej belaj ekzemploj de la moderna presarto, kiu jam aperis en Esperantujo. Ĝi ne nur estas abunde ilustrita (eĉ la mapoj estas speciale desegnitaj kaj portas Esperantajn nomojn), sed ĝi estas plena de informo pri Germanujo, aparte utila al la vizitanto aŭ studanto. Anoj de la 43a U.K. jam ricevis ekzempleron; aliaj povas ricevi kontraŭ unu respondkupono kaj bone legebla adreso. Interesatoj sin turnu al Germana Esperanto-Asocio r. a., Küln-Dellbröck, Bergisch-Glasbacher Strasse 1095, Germanujo.

## EL LETEROJ

"Kore ni dankas al vi pro viaj bondeziroj okaze de nia 70-jara Jubileo. Pli ol cent gratultelegramoj kaj -leteroj alvenis ĉe ni, kio estas signo, ke la tuta Esperantistaro partoprenis nian feston. La Esperantista kaj Germana gazetaroj detale raportis kaj ni dankas al vi, ke vi publikigis artikolon pri nia grupo en *The British Esperantist*.

Radio Bilbao, Roma kaj Wien aranĝis specialajn elsendojn kaj salutis nin tra la etero.

Ni deziras al vi kaj al ĉiuj viaj membroj feliĉigan Novan Jaron."

Esperanto-Grupo Nurnberg,
*Otto Pilhofer.*

"Ĉi tiun jaron nia Esperanto-Asocio havas 215 membrojn, kiuj pagis la jarkotizon, kaj la financaj aferoj estas multe pli bonaj. . . . En la venonta jaro almenaŭ tri Novzelandanoj intencas viziti vian landon: S-ro W. H. King kaj Ges-roj Wiltshire. Bondezirojn kaj salutojn al la samideanoj en Britujo. Arturo Wiltshire, Kasisto, N.Z.E.A." (N.Z.E.A. estas filiiĝinta federacio de B.E.A.)

"S-ro Smith diras (Translation Competition, Jan., p. 9), ke 'estas certa' estas preferinda ol 'certas', sed kial ne 'estas eble' anstataŭ 'eblas'? . . .Mi scias, ke la nuna uzado de tiu formo fariĝas ordinara, sed tio ne pravigas ĝin."

*Ernest B. Johnson*, London.

(Pri la vorto "ŝlagro" en recenzo pri Tiel Okazis, Jan., p. 13.) "En Usona-Angla slango, moda populara kanto nomiĝas 'hit-song' aŭ simple 'hit'. Tiun terminon oni 'tradukis' per la germana vorto *schlager*, de la verbo *schlagen* (frapi). Oni uzas similajn formojn en la Skandinaviaj lingvoj. De tie oni facile ricevas la Esperantan formon ŝlagro, 'hit-song'."

*J. C. Wells*, Cambridge.

## Praktika Iniciatemo

En la Bulteno N-ro 529 de la **B.B.C. Club** oni legas, **"Starigo de Sekcio pri la Internacia Lingvo.** Oni sugestas, ke Sekcio pri la Internacia Lingvo (Esperanto) estu formita inter anoj de la Kluboj, kaj la subteno de almenaŭ 25 anoj estas bezonita antaŭ ol la Administra Komitato rajtas konsideri la projekton. La celoj de la Sekcio estos konversacia praktikado, uzo de la lingvo por la dramo, k.t.p. Anoj kiuj interesiĝas pri la propono bonvole skribu al. . . ." (Sekvas la nomo kaj adreso, en B.B.C., de entuziasma junula membro de B.E.A.)

La anonco eble ne sukcesos starigi grupon, sed almenaŭ ĝi reklamas Esperanton *senpage* interne de la B.B.C. Eble aliaj en aliaj entreprenoj havus sukceson; do mi kuraĝas sugesti, ke tiuj aliaj provu similan anoncon en la propraj oficialaj bultenoj. *J.W.L.*

## INSTRUCTION IN ESPERANTO

(see *B.E.*, Dec., 1958) may be obtained (please enclose stamp for reply) at:

**Bournemouth.** A. J. Hicks, M.A., "Inglemere," Brownsea View Avenue, Lilliput, Poole, Dorset.

**Denton.** Norman Williams, M.A., Egerton Park County Secondary School, Denton, Manchester.

**Leicester.** Geo. E. Collis, 288, Welford Road, Leicester.

**Australia.** A.E.A. (Australian Esperanto Association) is publishing a special issue of *Australian Esperantist* in English to celebrate the Zamenhof Centenary Year, with articles by prominent Esperantists on various aspects of the life and work of Dr. Zamenhof. Copies, at about one shilling each, may be obtained from B.E.A. Please order quickly, but do not send money until asked.

# A 17th CENTURY I.L. PROJECT

In the history of the search for an International Language the two 17th century Englishmen, Dalgarno and Wilkins, have a conspicuous place; but a third Englishman, a contemporary of theirs, Sir Thomas Urquhart, has received only summary mention (Couturat-Leau 18; Durrant 25–6). A book, however, called "On the World-Language Problem in England in the 17th century" [Heidelberg, 1929), conveniently gives a long extract from his work, which was published in London in 1653 under the formidable title "Logopandekteision". From this it is clear that some of the principles on which Urquhart proposed to construct his language (for it seems that he never actually published it) anticipate the basic features of Esperanto; and it may therefore be interesting to see these expressed in the quaint English of the time. They constitute five of its "sixty and six advantages above all other languages", namely:—1. (All), if some strange word shall be proposed to them, shall be able to declare what part of speech it is. 2. (It) hath but 250 prime roots, upon which all the rest are branched. 3. By virtue of adjectitious syllabicals annexible to nouns and verbs, there will arise a greater number than in the most copious language in the world, 4. There is an art, out of every word, of what kind of speech soever it be, to frame a verb; whereby, for expressing all manner of actions, a great family is attained unto. 5. Of all languages in the world, it is easiest to learn; a boy of ten years old, being able to attain to the knowledge thereof, in three months' space.

It is difficult to reconcile this last claim with some of the other features which he stresses as advantages: 11 cases, 11 genders, 11 tenses (including those of participles), 7 moods, 4 voices, 4 numbers (including dual and "redual"), 10 vowels. A dubious quality, welcome perhaps to our neologists, is the fact that every word is to have ten synonyms; while for our poets there is the dazzling prospect of a vocabulary in which every word will have 500 rhymes. In spite of this richness Urquhart claims that his language allows great "conciseness of expression" and is consequently "fittest for courtiers and ladies" to speak in, for statesmen and merchants to write in, and for churchmen to pray in. A further advantage is deemed to be a large number of "emphatical" interjections.

So far the language is conceivable; but by what machinery can it be effected that "by the single word alone which represents the star, you shall know the magnitude, together with the longitude and latitude, both in degrees and minutes of the star that is expressed by it"; or that a general "shall be able, at the first hearing of the word that represents the name of a soldier, to know of what brigade, regiment, troop, company, squadron, or division he is, and whether he be of the cavalry or of the foot, a single soldier or an officer, or belonging to the artillery or baggage"? And how could it absorb all foreign idioms?

All in all, when Urquhart hoped that this list of qualities would render the reader "more enamoured of the language", he was probably being a little too optimistic.

*D. B. Gregor*

**John Masefield**

# HAVENO DE SENNOMBRAJ ŜIPOJ

laŭ afabla permeso de la aŭtoro tradukita de A. J. L. Hughes

Malsupre, profundege sub la maro, sub kvin mejloj da akvo, ie en la Golfo de Meksikio, troviĝas submara kaverno, tute tegmentita per koralo. Estas brilege en la kaverno, malgraŭ la profundeco de la maro. Kaj tie, en la brilo, la grandega marserpento kuŝas en siaj masivaj, bluaj volvaĵoj, portante sur la kornhava kapo kronon el oro. Tie li tre pacience sidas, de jarcento al jarcento, foje tremigante la akvon per la draŝado de siaj brankoj. Kaj ĉirkaŭ li senĉese naĝas la elstarokulaj, mutaj estaĵoj de la profunda Oceano. De ĉiuj fiŝoj li estas Reĝo, kaj tie li atendas la mondfinan juĝon; je tiu Tago, la oceanoj por ĉiam forpasos, kaj la malhela regno de la Serpento malaperos.

Foje, liaj korpvolvaĵoj tordiĝas; tiatempe la supraj akvoj furiozas. Faldante nur unu volvaĵon, li superŝutas la oceanon per ŝipruinoj; kaj tia estas la destino, ĝis la Oceano kaj la ŝipoj kune pereos en la agonio de la Serpento.

Nu, kiam tio okazos, dum la Serpento estos tuj mortonta, ĉio silentos, ĉio kvietiĝos, same kiel en la momento kiam, surŝipe, la ekipestro fajfadas. Kaj, dum tiu intervalo de silento, oni aŭdas fortan batadon sur ŝipsonoriloj, ĉar en ĉiu ŝipo iam alfundiĝinta la vivo saltante reeniros la blankajn ostarojn de la dronintoj. Kaj ĉiu droninta maristo, kovrita de algoj, resaltos al la vivo, kaj ekkantos, kaj ekbatos la sonorilon, kiel li kutimis fari dum la vivo, je la horo de ekveturo; kaj tiel grandioza kaj tiel dolĉa estos ties muziko, ke ekde tiu momento, mia filo, vi ja malalte taksos la harpludadon.

Sekve la volvaĵoj de la Serpento etendiĝos, simile al ŝnurego etendita, kaj defalos liaj longaj, torditaj kornoj. La ora krono defalos de la maljuna, lacega kapo. Kaj tie li kuŝos, mortinta kiel haringo; kaj la maro fariĝos kvieta, same kiel ĝi ekzistis antaŭ ol la tero aperis; neniu rompondo montriĝos. Tiam la granda, blanka baleno, maljuna Moby Dick, la reĝo de ĉiuj balenoj, leviĝos el sia submara ripozo; li kuniĝos, muĝante, kun sia tuta parencaro. Kaj ĉiu baleno el la mondo—la kaĉalotoj, la razildorsuloj, la rorkvaloj, la eŭbalenoj,* la kvardekbarelula Jonasulo, la narvalo, la ĝibulo, la orko, la draŝisto, la makrocefalo—ĉia cetaco rapidege alnaĝos, blovante ĉielen la aspergaĵon. Tiam, Moby Dick nomvokos ilin, kaj el ĉiu parto de l'Oceano, el nordo, el sudo, de Callao ĝis Rio de Janeiro, eĉ unu baleno ne forestos. Poste Moby Dick klarione trumpetos, kaj la tuta aro da balenoj alprofundiĝos, ĉar ilia tasko estas flotigi de malsupre la ŝipruinojn.

Tiam, kiam ili resupreniros, la suno estos subiranta malproksime okcidente, kiel pilko el ruĝa fajro. Kaj ĝuste tiam, kiam ĝia kurbo estos subironta, ĝi ne plu subiĝos, kaj ĝi kuŝos tie, kvazaŭ sur sojlo. Kaj la steloj, kaj la tero, kaj la vento, ne plu ekzistos. Kaj estos nenio, krom la Oceano, la ruĝa arkaĵo de la suno, kaj la balenoj, alportantaj la ŝipruinojn; kaj tiam sur la maro aperos radio de lumo. Ĉiu baleno estos levinta sian ŝipruinon de sur la koralo, kaj ili svarmos en la maro; remŝipoj kaj

* Anglalingve *Right Whale* (Eubalenus mysticetus).

velŝipoj, grandegaj triferdekuloj, imponaj blankstelaj poŝtŝipoj, batalŝipoj; ĉiu verda pro ŝlimo, sed ĉiu servata de kantantaj maristoj. Kaj antaŭe naĝos Moby Dick, trenante tiun fiŝkaptistboaton, en kiun enŝipiĝis Nia Sinjoro, kune kun la dolĉaj Apostoloj.

Kaj Moby Dick laŭtege muĝos, kvazaŭ la sireno de batalŝipo, kaj plenrapide eknaĝos okcidente al la suno. Kaj la balenoj responde muĝos. Kaj ĉiuj dronintaj maristoj kantos siajn markantojn, kaj ritme frapos sur la sonoriloj. Kaj la tuta ŝiparo plenrapide eknaĝos okcidenten, al la bordo inter maro kaj ĉielo. Je mia vorto, la oceano blankege ŝaŭmos sub la pasado de la ŝipoj kaj de la fiŝegoj!

Kiam ili estos alvenintaj ĉe la suno, la ruĝa globo malfermiĝos kiel pordo, kaj Moby Dick kaj ĉiuj balenoj kaj ĉiuj ŝipoj enfluegos en la ankrejon de la Ĉielo.

Ĉi tio estos trankvila, terenfermita etendaĵo de akvo, en kiu ĉiuj ŝipoj de la mondo ankre flotos, vicon post vico, kaj la ŝipanaroj kolektiĝos sur la antaŭkasteloj, kantante; je neniu vaĉo ili deĵoros; nenian ŝnuron ili devos envolvi; neniu maato atendos, por breĉi la kapojn al ili. Ilia sola tasko estos, frapadi sur la sonoriloj. Kaj ĉiu el la kompatindaj, flikaĵoportantaj, ĉifonvestitaj ŝipanoj, mia filo, brilegos en blanka kaj ora vestaĵo. Kaj surtere, inter la palmoj, stariĝos helaj trinkejoj por la gudrotukuloj; eble vi kaj mi rerenkontos unu la alian, kaj mi rakontados, sen devo ĉesi, ĝis ni aŭdos la lastan sonorilon.

---

## ZAMENHOF CENTENARY CAMPAIGN: Jan. 1958–Dec. 1959

### Regional Competition: State at 31st December, 1958

| | *Area* | *Quota* | *Points* | *Per cent.* |
|---|---|---|---|---|
| 1. | Overseas | 300 | 408 | 125.0 |
| 2. | South-Eastern Federation | 250 | 303 | 121.2 |
| 3. | Southern Federation | 200 | 196 | 98.0 |
| 4. | Lancashire and Cheshire Federation | 300 | 281 | 93.8 |
| 5. | Remainder of G.B. and Ireland | 300 | 237 | 79.0 |
| 6. | Scottish Federation | 300 | 222 | 74.0 |
| 7. | London and Middlesex | 400 | 284 | 71.0 |
| 8. | Eastern Federation | 200 | 121 | 60.5 |
| 9. | South Midland Federation | 250 | 151 | 60.4 |
| 10. | East Midland Federation | 200 | 107 | 53.5 |
| 11. | Yorkshire Federation | 300 | 151 | 50.3 |
| 12. | Somerset and Gloucester Federation | 250 | 97 | 38.8 |
| 13. | Devon and Cornwall Federation | 200 | 72 | 36.0 |
| 14. | North-Eastern Federation | 250 | 83 | 33.2 |
| 15. | Wales and Monmouthshire | 200 | 34 | 17.0 |

There is little change in the order of placing of the Federations since last month. At the end of the first year of the Competition the most remarkable observation that can be made as regards England and Wales is the way activity dwindles as one goes north or west from the Home Counties (with the honourable exception of Lancashire and Cheshire). This applies equally to enrolments and to financial support for the B.E.A. Wake up, the North and West!

*C.M.H.*

# PAĜO POR GEKNABOJ

Contributions for this page will be welcomed by W. J. Nesbitt, 4, Clarence Villas, Bishop Auckland, Co. Durham.

This month we have two accounts of the finding of mineral deposits, in South Africa and in the Middle East; the third is a story of language difficulties, taken from a book of information and entertainment which I can recommend to you all—*Miru, Pensu, Ridu!*—edited by Paul Benneman, published in the Netherlands and obtainable from B.E.A. at 11s. 6d.

**La Eltrovo de Diamantoj en Sud-Afriko.** Kelkaj nederlandaj infanoj en Sud-Afriko unue trovis diamantojn tie. Ĉi tiuj infanoj ne havis ludilojn, sed ludis per aĵoj trovitaj sur la stepo. Ili trovis kelkajn beletajn ŝtonojn proksime al rivereto; kelkaj el ĉi tiuj ŝtonoj estis malpale ruĝaj, kelkaj ruĝetaj kaj tiel klaraj kiel kvarc-vitro. Iu farmisto forsendis unu el la ŝtonoj por ke ĝi estu muntita en broĉo; kaj oni vendis ĝin por £500.

La novaĵo pri la eltrovo de diamantoj altiris en la landon milojn da homoj kiuj deziregis riĉiĝi. Oni vendis farmbienojn por grandegaj prezoj, kaj minejoj kaj minejaj vilaĝoj ekfondiĝis. Unu el tiaj lokoj nun estas la prospera urbo Kimberley, kie troviĝis tre fama diamanto.

De post la jaro 1867 estas trovitaj tridek du tunoj da diamantoj, je la valoro de £250,000,000.

el la angla de
*J. C. Bussey* (13),
Darlington.

**La Eltrovo de Oleo.** La antikvaj egiptoj kaj babilonanoj ofte uzis oleon, ekzemple por kontraŭakvigi kaj por konservi mumiojn. Ili trovis la oleon tute hazarde. Ĝi foje trafluetis ĝis la supraĵon de la tero, kie ĝi kolektiĝis en gluecaj, nigraj lagetoj; ĉe unu lageto en Irano nomita Masjid-i-Suleiman la oleo ekbrulis kaj pro tio, ke la flamoj konstante ricevis oleon el sub la tero, ili bruladis dum multaj jarcentoj, dum kiu tempo venis homoj el multaj partoj de la mondo por adori la sanktajn flamojn.

Kie la oleo-lagetoj kuŝas proksimaj al la supraĵo de la tero, homoj trovis, ke iliaj akvo-putoj ofte pleniĝis de oleo. Kiam la homoj eltrovis kiel utiligi la oleon, ili komencis speciale elfosi putojn por trovi ĝin. Sed nun tiuj putoj ne provizas sufiĉe da oleo por la mondo, kaj nuntempe geologiistoj uzas modernajn rimedojn por trovi la oleon kiu kuŝas multe pli profunde sub la krusto de la tero.

el la angla de
*M. Foxon* (13),
Darlington.

**Miskompreno.** La fama franca verkisto Alexandre Dumas troviĝis dum vojaĝo tra Germanujo en malgranda vilaĝo, kiam subite ekpluvegis. Ĉar li ne havis pluvombrelon kun si, kaj ĉar krome li sentis malsaton, Dumas eniris la vilaĝan gastejon. Li eksentis grandan apetiton je fungoj; ne scipovante la germanan lingvon, li desegnis tion, kion li deziris, sur pecon da papero. La mastro, vidinte la desegnon, kompreneme kapjesis, eliris el la gastoĉambro kaj jam post duona minuto revenis, transdonante al la mirigata fremdulo, kun afabla rideto . . . pluvombrelon !

el *Miru, Pensu, Ridu!*



# NEW BOOKS

*Order starred books from the B.E.A., others from the addresses given*

Verkojn recenzotajn oni bonvolu sendi po du ekzempleroj al la Sekretario, B.E.A., 140, Holland Park Avenue, London, W.11: nepre samtempe indiku la prezon kaj la afrankon

***Gastronomia Terminaro.** Erhard Urban. Eldonita de U.E.A. 128 p., broŝ. Prezo 6ŝ. 6p., afr. 5p.

This work first appeared in the *Jarlibro de U.E.A., 1958, Dua Parto,* and immediately brought forth some adverse criticism from a few of our members. It seems generally agreed that the work shows signs of hasty compilation, that in the Esperanto column euphony and brevity often seem to be disregarded, and that many terms are much too long and clumsy for a menu card. Only an expert in this particular field with a knowledge of Czech (the work appears to be based on a Czech publication) could competently review this work. However, the criticisms received may be of value and we give a selection below. (Items from the *Terminaro* are given an initial capital letter; page numbers refer to edition in *Jarlibro.*)

Page 105 Artiĉoko, but p. 110 Artiŝoko. 106 (also p. 211) Konkoj/Mussels=mituloj. 108 Kolbaso—Salamo (difference unexplained); Sausage of Pork? 110 Toŭsto (ugly form, better *rostpano*); White Beans=haricots? Confusion between Sardelo and Anĉovo (and elsewhere). 111 Barĉo is sufficient. 112 Buljono (always beef?); Ĉasaĵsupo (tongue twister, better *ĉasaja supo*). 113 Clear Soup not necessarily Bova; Grieta not necessarily Barley. 114 Mulligatawny. 117 Topinamburoj (better *terpiroj*); Green Bean=french bean; Pearl Barley = perlhordeo; Spring Soup is p. 119 Printempa Supo (better). 118 Supo kun Tomatpremaĵo (better *tomata pureo*). 119 Cabbage=savoy; Tritikgrietetoj =p. 188 Tritika Griaĵo (case for *semolino*?). **Fish.** 120 Alburno=bleak, Whiting=merlango, Dace=leŭcisko. 121 Bramo=bream; Kobito = loach, Gudgeon=gobio; Lojto=burbot, Eel Pout=zoarko; Orfiŝo (Goldfish suffices); Karaso=crucian carp. 122 Siluro=cat-(skeet-) fish; Ĉoto=bullhead, miller's thumb; Brill =romb(fiŝ)o. 123 Kabiljaŭo (fresh or mashed Cod?); Merluĉo=hake, Dried Cod=sekigita moruo; Mureno =moray; Plateso=plaice; Flounder =fleso. 124 Tino=tub, vat, Tunny=Tinuso.

125 Bat-miksitaj=kirlitaj?; Aromkreskaĵoj = potherboj, spicherboj, aromaj herboj; one Ŝenoprazo?; Ovoj Duon-malmolaj=milde boligitaj. 126 Ovo ĝuste demetita (!)=ovo freŝa. 127 Poached Egg(s) appears twice—meaning of Czech? 128 Bova Viando =bovaĵo. Bakitaj Ovoj/Fried Eggs? Bova Gulaŝo (sufficient?). 130 (and elsewhere) Knedliko (better *pastbuloj* or simply *buloj*). 131 One cepo? 132 Rumsteko=rumpsteko? Bova Viando=bovaĵo. 134 Bovida Viando =bovidaĵo. 136 Porka Viando=porkaĵo. 137 Leg of Pork (no mustard sauce or dumplings). 138 Porka (?) Lardo. 139 Porka Muzelo Bolita= . . . Boligita. 141 Ŝinko kun Ovoj Bakitaj (omit Angla). 142 Ŝafa Viando=ŝafaĵo. 143 Ŝafstufaĵo laŭ Irlanda Maniero=Stufaĵo Irlanda. 144 Ŝafida Viando=ŝafidaĵo. 145 Kurja=PVS kareo; 146 Ŝafida Viando Bake Krustigita=ŝafidaĵo gratenita; Kapra Viando=kapraĵo. 147 (foot-

